

En tiu ĉi numero

Dans ce numéro

Pri la UK en Lillo	1
Mia vojaĝo en Kubo	2
Arieĝa maja babilmango.....	2
L'examen mondial d'espéranto	3
Forum des langues 2015.....	4
En la Natur-Historia muzeo	5
L'espéranto en Roumanie	6
Seminario en Tuluzo	7
Site internet sur les végétaux.....	7
Charlotte se présente	8
Kreu vian mondon, kaj lernu E-on...8	
Raporto pri Alternatiba Tuluzo.....	9
Kataluna kongreso en oktobro	10
Manif pour l'occitan en octobre	10
Novajoj en la libroservo.....	11
L'agenda du Kroko.....	12

« La Krokodil' » est le bulletin d'information du Centre Culturel Espéranto de Toulouse.

Avant leur parution dans ce bulletin, vous pouvez lire et commenter les articles du « Krokodil' » en ligne sur le Portail de l'Espéranto en Midi-Pyrénées. Toutes les contributions, en français comme en espéranto, sont les bienvenues. Envoyez-nous vos articles et photos.

Visitez le portail

<http://esperanto-midipyrenees.org>



ESPERANTO-KULTUR-CENTRO

Centre Culturel Espéranto de Toulouse

31, rue Franc 31000 Toulouse

Tél. : 05 81 34 72 37 - 06 31 80 40 07

E-mail : esperanto.toulouse@free.fr

Site : esperanto-midipyrenees.org

Pri la Universalo Kongreso en Lillo

Fakte mi helpis lunde kaj marde vespere en UK kaj partoprenis vendrede kaj sabate (la 1-an de aŭgusto) kiam mi vidis la mirindan teatraĵon "Feliĉas ĉiuj".

Mi preferis turismumi kun geesperantistoj (kiel Lottie de Kanado, Markéta kaj Adamo de Polando...) ĉar en la kongreso partoprenis homamaso do tio estis malfacile por diskuti kaj koni ilin. Mi elektis promeni kaj tagmanĝi kun fremduloj ofte en malsamaj lokoj en la belega urbo de Lillo kie la loĝantoj afablegas ! Mi bone ŝancis loĝi en la junulgastejo (malnova konstruaĵo) kie loĝis 150 esperantistoj. Do ĉiuvespere mi preparis kaj manĝis en la eta kuirejo kun nepalanoj aŭ ĉinoj aŭ koreoj aŭ francoj kompreneble !



Mi ŝategis revidi geesperantistojn de Kubo kaj « Ĝoja(n) » de Pekino, ŝi prezentis filmetojn pri « Amo kaj teo » kiujn vi povas vidi per reto en Ĉ.R.I.(Ĉina radio internacia) .

En mia dormĉambro mi renkontis Olga(n) de Rusio , poste Georgina(n) de Kubo dum la lastaj tagoj.

Mi helpis kelkajn esperantistojn en la stacidomo pri biletoj, mi iris kun nepalano por aĉeti grandan valizon en supervendejo.

Mi vojaĝis per trajno por vidi la faman koncerton de Jomo en « Villeneuve d'Ascq » kun Adamo de Polando kaj aliaj esperantistoj. En tiu koncerto, multe da spektantoj estis tre junaj ĉar estis la esperantista junularo kiu dancis en la salono.

En la aŭtono, mi esperas partopreni la katalunan renkontiĝon kie la skalo estos pli homa ol en UK de Lillo !

MARIDO

Mia vojaĝo en Kubo

Marie Do rakontas sian vojaĝon en Kubo, en aprilo 2015. Ŝi diras al ni kiel ŝi uzis Esperanton por interŝanĝi kun lokanoj, kaj ekhavi novajn amikojn.

Mi tre feliĉas pri mia vojaĝo en Kubo. Mia celo estis renkonti mian esperantan korespondantinon "Yoandra Isabel Rodriguez" kaj ŝian familion en "Sancti Spiritus" kiu situas en la centro de Kubo. Mi malkovris ŝian vivstilon, ĉiutagan vivon kaj diskutis diversajn temojn. Ŝia dekjaraĝa filo "Carlos" (Karlo) komprenas kaj parolas Esperanton, "Hailong" (Hejlon) dudekmonataĝa komprenas li apenaŭ komencas paroli la hispanan lingvon.

Kune ni turismumis en la belega urbo "Trinidad" kiu situas nur 70 kilometrojn de ŝia loĝejo kaj ĉe la marbordo proksime de "Trinidad". Ŝi malfacile organizis la ekspedicion kun sia edzo ĉar en Kubo ekzistas taksioj nur por kubanoj, aŭ multekostaj taksioj por eksterlandoj. Mi renkontis alian esperantiston "Norberto Diaz Guevara" en "Sancti Spiritus". Mi vizitis liajn patrinon kaj fratinon en ilia familia domo. Poste mi reiris en la Habanon por unu nokto. Mi turismumis sole en la regiono "Vinales" kie oni kultivas famajn tabakojn por fabriki konatajn cigarojn. Fine mi restis 3 tagojn en La Habano por renkonti esperantistojn kaj kune viziti la faman urbegon. Mi loĝis en la domo de "Vilhermo Lutermono", lia edzino "Maria Julia" kaj iliaj infanoj "Marla" deknaŭjaraĝa, "Karlo" nur sepjaraĝa. Mi tre ŝatis paroli kun "Maria Julia" pri infanoj, ktp...

Mi partoprenis en la renkontiĝa festo kiu okazadas ĉiumonatfine en la loko de KEA (Kuba Esperantista Asocio) en la 25-a de Aprilo vespere. Vilhermo petis esperantistojn kune viziti La Habanon. Do dimenĉe la 26-an de Aprilo "Jenia" kaj "Ronald" prezentis al mi la malnovan parton de la urbego, poste antaŭ la tagmezo alvenis "Guille", kantisto. Kvarope ni piediris tra la malnova kvartalo kaj en la fama komerca strato kiu nomiĝas "calle Obispo" (episkopo-strato). Lunde mi kaj "Miguel Angel Gonzalez Alfonso", kiun mi renkontis antaŭe unuan fojon en Tuluzo, duope ni vizitis la plej grandan kolonianan tombejon en "Vedalo", la sama kvartalo kie mi loĝis. Ni pediris al la ĉina kvartalo en la centro de La Habano kaj vizitis belan botanikan ĝardenon.

Mi dankegas ĉiujn esperantojn kiuj helpis min por lerni Esperanton, gastigis min kaj vizitigis al mi Kubon.

MARIDO

Arieĝa maja babilmanĝo

Kiel kutime, ni kun plezuro ricevis artikolon de nia fidela raportistino pri la regulaj renkontiĝoj de niaj amikoj en Arieĝo!

La renkontiĝo ĉi-foje okazis en belega valo de Bethmale, ĉe Anne, en ŝia saporpalaco. Dekkvarope ni dividis fortajn emociojn, ne nur pri la neegalebla akcepto, sed ankaŭ pri la diverseco de la spertoj. Marie-Do ĵus revenis el Kubo: ŝi tie renkontis sian korespondantinon, kaj kelkajn esperantistojn dank' al kiuj, ŝi klarigis por ni la ĉiutagan vivon de kubanoj. Anne-Marie vizitis Grekujon kun familianoj, kaj kvankam ŝi ne renkontis esperantistojn ŝi notis ĉiujn grekdevenajn vortojn, ekzemple "kaj" – kvankam grekoj skribas ĝin malsame. Jopo kaj Evelyne instruis Esperanton en Maroko kadre de la NRO La Blua Oranĝo... Tial Rachel, Hassan kaj Yasmine venis el fora Tarno por babilmanĝi kun ni. Ĉar Hassan opinias ke la universala lingvo povos diskoniĝi en Maroko, li sopiris pri Korano tradukita en la esperantan. Nia kara amiko René havas ununuran ekzempleron de tiu sankta libro kaj akceptis ke ni skanu ĝin.

Post varma akcepto de Anne, kiu rapide prezentis sian laboron, klarigante ke per la kultivitaj kaj sovaĝaj fruktoj aŭ plantoj, ŝi kreas bongustajn ŝorbetojn, ni iom ceremonie donacis al Hassan ne nur la Koranon, sed la Biblion, kaj, kiel "ĉerizon sur kukon", La inĝenia kavaliro Don Kiĥoto el Manĉo. La tri libroj, sufiĉe imponaj prezentas sin kiel valorajn studobjektojn, forajn celojn por komencantoj ! La etoso estis kiel kutime ege amika, ĉiuj povis interŝanĝi, plej ofte en Esperanto, fojfoje krokodilante, sed la bongustaj pladoj kaj ĉefe la emo babili senlime gvidis la konversaciojn. Tiuj babilmanĝoj spegulas la veran amikecon kiu regas inter Esperantistoj kiuj havas grandan plezuron trovi unu la alian. Ĉiu povas rakonti sian sperton, anonci la okazontaĵojn, aŭ simple babili pri siaj pasioj. Tiel Sunkompanionoj anoncis la venontajn "Nomad'kursojn": la unuan septembre, 10 tagojn en Ĉekio, la sekvontan unu monaton en Malagasio komence de la jaro 2016. La teamoj ankoraŭ ne kompletas, la propono rondiru pere de la geamikoj! Rapide alvenas la momento kiam klientoj aperas sur la teraso por gustumi la delikatajn ŝorbetojn. Anne nun laboros, kaj ni disiĝas, feliĉaj je la ideo baldaŭ renkontiĝi denove.

SUNKOMPANIO

Douze candidats à l'examen mondial cette année

Pour la troisième fois, les 29 et 30 mai notre association a participé à la journée d'examen mondial d'espéranto. Douze candidats ont passés les épreuves écrites ou orales.

Debout face aux candidats venus ce matin du 30 mai 2015, Jeannette Cash ouvre chacune des enveloppes scellées qui contiennent les copies d'examen. Une fois qu'elles ont été distribuées, que les dernières recommandations ont été données, chacun s'immerge dans sa copie et se met à plancher. Il est 9h10, et au même instant ils sont 116 candidats dans 12 villes du monde à découvrir les mêmes sujets.

Une partie orale était également proposée aux candidat. Elle a pu se dérouler grâce à la famille Cash qui a accueilli chacun des candidats, pour une épreuve en direct devant webcam, dans d'excellentes conditions techniques. Les résultats de cette partie ont été très vite connus et sont très encourageants pour le reste de l'examen.

Reste à attendre la correction des copies écrites. À l'heure où nous écrivons ces lignes elles n'ont pas encore atteint leur destination, le centre d'examen universitaire ITK à Budapest. Une fois qu'elles seront arrivées, les correcteurs feront leur travail et les résultat seront connus dans un délai d'un mois. Nous ne manquerons pas de l'annoncer sur ce blog !

Depuis la première journée d'examen mondial, notre association a participé à cet évènement à trois reprises. Les sessions toulousaines ont réuni en tout trente-trois candidats en 2012, 2013 et 2015. Notre ville se place ainsi parmi celles qui ont le plus contribué à mettre en valeur l'espéranto grâce à ces examens reconnus par l'Association Internationale des Examineurs de Langue (ALTE) et par le Conseil de l'Europe.



CHRISTOPHE

Notre présence au Forom des Langues 2015 à Toulouse

Nos sympathisants le savent: s'il est un endroit où ils sont sûrs de nous trouver, c'est bien la place du Capitole à la fin du mois de mai ! Petit bilan à plusieurs mains, rédigé par ceux qui ont donné de leur temps pour mieux faire connaître la langue internationale espéranto.

Le 31 mai s'est déroulé sur la place du Capitole à Toulouse le "Forom des langues", où bien sûr l'association toulousaine d'espéranto était présente toute la journée sur son stand. Après un démarrage boiteux où il nous



fallu déménager 4 fois, nous avons été fixé pour de bon face à de joyeux brésiliens. Notre stand était situé sur l'un des principaux axes de circulation, ce qui nous a permis de nous placer au milieu de la foule pour distribuer des dépliants et de recevoir – un peu trop de soleil.

Christophe arrêta des groupes d'environ 5-6 personnes toutes les heures afin de les initier à l'espéranto à l'aide de panneaux présentant l'alphabet, les nombres, la formation du vocabulaire avec les affixes, et les raisons d'apprendre l'espéranto.

En se promenant à travers les stands, chacun de nous a pu rencontrer d'autres personnes (traducteurs, europhiles, etc...) avec qui il était possible d'échanger sur les langues et la politique linguistique.

De nombreux visiteurs sont passés, surtout l'après-midi, pour acheter des livres, s'informer, nous laisser leur contact ou s'inscrire aux cours, et nous comptons sur eux pour devenir de nouveaux apprenants d'espéranto ! — **Nicolas**

La solidarité entre espérantistes qui n'est pas qu'une idée abstraite, c'est même l'un des piliers de notre culture, m'a fait venir d'Ariège aider l'association toulousaine à promouvoir l'espéranto dans le cadre du Forom des langues.

Nous avons reçu des personnes de tous âges – une demoiselle de 11 ans m'a même étonné, tant elle était demandeuse d'apprendre – et de tous horizons. Nous sommes également allés vers les stands qui nous entouraient, pour nous informer des particularités linguistiques d'autres langues, nationales ou locales. Christophe a quant à lui organisé des « cours express » pour des groupes, parfois étoffés, de passants. Beaucoup d'entre eux nous ont laissé leurs coordonnées pour recevoir nos informations au sujet des cours et de nos actions. Journée très enrichissante, y compris pour nous. – **Alain**

En visite à Toulouse, j'ai passé une partie de la journée dans cet immense et magnifique forum, principalement sur le stand espéranto. J'ai pu constater entre autre l'efficacité du cours express dispensé toutes les heures, et l'excellente pédagogie de Christophe, qui a permis à plusieurs dizaines de visiteurs de repartir avec les connaissances de bases. Ce genre d'actions, simples rapides et mobiles est le meilleur moyen de toucher en particulier les jeunes et permettre à l'espéranto d'être connu du plus grand nombre. – **Vincent**

Sous une belle journée chaude et ensoleillée, nous voici motivés pour promouvoir la langue universelle qu'est l'espéranto.

C'est ainsi avec plaisir que j'ai partagé mes 2 heures de contribution avec Christophe, Alain et Nicolas à renseigner les visiteurs et à distribuer tracts et prospectus afin de les inciter à nous rejoindre dans cette belle aventure. À l'année prochaine sans aucun doute car l'espéranto a toute sa place plus que jamais aux côtés des autres langues dans ce forum ! – **Céline**

En la Natur-Historia Muzeo de Tuluzo

Okaze de la unua dimanĉo de Junio, grupeto de esperantistoj profitis la senpagecon de la muzeoj por sekvi Alain, kiu gvidis viziton de la Natur-Historia Muzeo de Tuluzo – komentatan en Esperanto! Alain dividas kun ni sian resumon de la vizito.

Hodiaŭ ni vizitis la Naturhistorian Muzeon de Tuluzo. Ĝi estas unu el la plej gravaj muzeoj en Tuluzo. Ĝi situas en prestiĝa loko, en malnova karmelana monaĥejo, ene de la plej bela ĝardeno el Tuluzo, la Ĝardeno de la Plantoj. Ĝi estis kreita en 1796 de la naturalisto Philippe-Isidore Picot de Lapeyrouse, sed ĝi estis tiam rezervita nur por naturalistoj. Ĝi malfermiĝis al publiko en 1865. Pro malfortaĵoj en la konstruaĵo, la muzeo estis fermita en 1997 kaj nur remalfermiĝis en januaro 2008, kun tute novaj, kaj pli vastaj lokoj : 6000 m² da areo sur kvar etaĝoj, al kiuj aldoniĝas ekstera parto, 5500 m² vasta, kiu estas la botanika ĝardeno Henri Gaussen. Tiel, la nuna muzeo estas la dua plej granda naturhistoria muzeo el Francio, tuj post tiu de Parizo. Ĝi gastigis 270 000 vizitantojn en 2014 kaj entenas kolekton da pli ol 2,5 milionoj da objektoj. Nur kelkaj 5 000 estas videblaj de publiko. La cetero estas sekure kaj zorge stokata en la konservejo.

En la enirejo, nomata "la granda kvadrato", la historiaj klostraj muroj miksiĝas kun modernaj konstruaĵoj kaj vegetaĵa muro 15 metrojn alta. Skeleto de Kecalkoatlo estas pendigita je 10 m alte. Kun 12 m da enverguro, tiu prahistoria reptilio estas la plej granda besto kiu iam ajn flugis sur Tero. Ĝi flugas super vera azia elefanto remburita, Punch el la cirko Pinder, en la muzeo ekde 1910.

La subteretaĝo gastigas la provizorajn ekspoziciojn. Temis nuntempe pri la "bestaj beboj", ekspozicio ĉefe dediĉata al infanoj. Ni do ne vizitis ĝin, kaj rekte iris al la konstantaj ekspozicioj. Tiuj



estas dividitaj en kvar temojn. En la teretaĝo, la unua temo estas "Tero, aktiva planedo". Gravito, formado kaj funkciado de nia planedo, vulkanismo, platotektoniko, erozio, jen kelkaj punktoj pritraktitaj en tiu parto, kie la vizitanto povas ŝajnigi tertremojn, aŭ konstati la erozian efikon fare de akvo. Tuj poste, ni vidis la "muron de la skeletoj", kiu estas unu el la plej belaj ekspoziciaĵoj de la muzeo. Ĝi konsistas en grandega vitrino, 120 metrojn longa kaj 6 metrojn alta. Ĝi enhavas 75 skeletojn en dinamika pozicio por prezenti la bestojn en ilia medio (aero, akvo, grundo, arboj...)

kaj ilustris ilian agmanieron, movkapablon aŭ predadon ekzemple per ĉasaj scenetoj). Danke al ĝia duobla vando el vitro, la skeletoj estas videblaj interne kaj ekstere de la konstruaĵo. Necesis 4 jarojn por ĝin realigi! Ni poste finvizitis la teretaĝon per la dua temo, "Ordo de vivaĵoj". Tiu parto temas pri la diverseco, la klasifiko kaj organizo de la vivaj estaĵoj (vegetaĵoj, insektoj, moluskoj, aktinopterigoj, mamuloj, birdoj).

En la unua etaĝo, ni vizitis la trian temon "La vivo dum tempo", kiu klarigas ke la vivaĵoj multe evoluis dum tempo, de la origino de la vivo sur la Tero antaŭ 3,8 miliardoj da jaroj. Fine, ni vidis la kvaran temon, "La bezonoj de la viva mondo", kiu prezentas la precipajn funkciojn de la vivaĵoj: protektiĝo, reproduktiĝo, komunikado, moviĝo kaj nutriĝo. Ni ne povis vidi la duan etaĝon, kiu gastigas laborejojn kaj la konservejon, ĉar ĝi ne estis vizitebla tiun dimanĉon.

Nia vizito finiĝis per la botanika ĝardeno Henri-Gaussen. Ĝi konsistas el du partoj. La ekstera kolekto elmontras ĉirkaŭ 1000 plantspeciojn aranĝitajn laŭ "etnobotanika spiralo", kie plantoj estas organizitaj laŭ siaj rilatoj al homoj (nutraj, industriaj, kondimentaj, medicinaj kaj toksaj). Aliflanke, la forceja kolekto, enhavas ĉirkaŭ 1300 speciojn da tropikaj kaj karnovoraj plantoj, sub 300 m² da forcejoj.

ALAIN GERARD

L'esperanto en Roumanie

La présence de l'espéranto en Roumanie.

Un article de Diana, étudiante roumaine cette année à Toulouse, et bénévole au Centre Culturel Espéranto quelques jours cet été.

De nos jours, on estime qu'il y a approximativement 3000 locuteurs d'espéranto en Roumanie. Les écrivains roumains les plus connus comme Eliade, Eminescu et Cărtărescu ont été traduits dans cette langue, utilisée notamment pendant la période communiste. Le premier dictionnaire espéranto-roumain est apparu en 1889.

Heinrich Fischer (1879-1960), un traducteur, éditeur et industriel hébreu, a appris l'espéranto en 1902. En 1904, il a initié les premiers cours d'espéranto et a mis en place le premier groupe d'espéranto en Roumanie. Il est aussi le fondateur et le président de la Société de l'Espéranto de Galați (la première société de ce type en Roumanie). En 1910, il a reçu l'ordre de "l'Étoile de la Roumanie".

Peu de roumains savent que de nombreuses personnalités du pays étaient espérantistes. La première sur la liste serait Carmen Sylva (le nom de plume de la reine Elizabeth de Roumanie). On pourrait aussi mentionner le cybernéticien Stephen Odobleja, les poètes Tudor Arghezi, Geo Bogza, Radu Tudoran et même Ana Aslan.

L'espéranto - l'arme secrète des roumains pendant la période communiste

À une époque où les Roumains vivaient dans la crainte que les Services Secrets soient toujours sur leurs traces, ils ont utilisé l'espéranto, un langage code qu'ils appelaient "le langage des oiseaux". L'espéranto était une langue que les communistes détestaient et a été perçu comme une sorte d'arme contre eux. L'espéranto a eu beaucoup d'ennemis en Roumanie. Même si Nicolae Ceausescu ne l'a pas interdit officiellement, il a limité l'accès aux associations espérantistes.

Marian Constantinescu, professeur d'espéranto à Bucarest, se rappelle de la période communiste. Il déclare pour evz.ro que : "C'était difficile de donner des leçons sans avoir peur", mais il a continué parce qu'il était fasciné par l'espéranto et par l'enthousiasme de ses élèves.

Les professeurs d'espéranto Michael Clover et Rodica Todor, enseignent à ceux qui sont attirés par l'exotisme de cette langue unique. Pour les deux enseignants, l'espéranto n'est pas une bizarrerie linguistique. C'est plutôt une histoire d'amour qui a commencé il y a quelques années.

"En 1972, j'étais enseignant à Sighet et a eu lieu un cours d'espéranto. J'ai réalisé tout de suite que ce cours était très intéressant pour moi et j'ai décidé d'apprendre l'espéranto. Puis j'ai assisté à plusieurs cours en Bulgarie, en Allemagne, en Islande. A Burgas, après des cours intensifs, j'ai obtenu mon permis d'enseigner l'espéranto" explique le professeur Michael Clover.

Rodica Todor, présidente du club Amikeco, qui était passée à Toulouse en 2012, dit : " Pour les roumains, l'espéranto est très facile à apprendre. Si vous étudiez attentivement, vous pouvez lire et vous exprimer correctement en 4 mois. Être roumaine m'a beaucoup aidé, parce que 70% des racines de l'espéranto sont latines, 20% anglo-saxonnes et 10% slaves, grecques, etc."

Grâce aux gens passionnés par l'espéranto et grâce aux bénévoles de l'Association Roumaine d'Espéranto, la langue et son histoire unique restent vivantes en Roumanie.



DIANA CRISTINA

Seminario en Tuluzo

[Raporteto de unu el la partoprenintoj.]

Komence de junio okazis en Tuluzo interesa semajnfina seminario pri rolludoj.

La antaŭan vesperon, ni kunmanĝis kaj babilis kun la esperanta tuluza grupo en agrabla etoso. Sabaton komencis la "serioza" lernado. Tamen ne tro serioza sed amika. Christophe Chazarein organizis kaj vigligis la seminarion, momente helpata de Marion. Ni estis naŭ atentaj lernantoj, instruintoj, antoj, aŭ ontoj en niaj kluboj. Kelkaj loĝas apud Tuluzo sed aliaj venis de pli for. Ni vidis kiel krei kaj uzi rolludon por kiu nivelo, kiu celo, kiujn erarojn eviti. Praktiko sekvis teorion. Ĉiuj volonte siavice ludis rolon aŭ gvidis. Ni amuziĝis sed havas nun bazojn por vigligi la kurson en niaj kluboj. Bedaŭrinde la seminario daŭris nur ĝis dimanĉo matenfino. Posttagmeze, kelkuj jam foriru sed kelkaj restis por viziti muzeon pri naturscienco gvidata en Esperanto de membro de la Tuluza grupo. Tre riĉa kaj interesa ĝi estis.

SYLVIE

Mon site internet sur les végétaux

Ce n'est pas un site sur la botanique ni le jardinage mais juste une collection de presque 15 ans de photos, que j'ai prises lors de mes promenades et vacances, en France ou à l'étranger. Vous y trouverez près de 900 espèces différentes classées par ordre alphabétique du nom scientifique (latin), avec en regard de chacune le nom usuel en français, et maintenant en espéranto !

Bonjour à tous !

Après plusieurs mois de travail, je suis fier de vous présenter mon site internet sur les végétaux, avec désormais le nom de chaque plante traduit en espéranto.

<http://a.gerard4.free.fr>

Ce n'est pas un site sur la botanique ni le jardinage mais juste une collection de presque 15 ans de photos, que j'ai prises lors de mes promenades et vacances, en France ou à l'étranger. Vous y trouverez près de 900 espèces différentes classées par ordre alphabétique du nom scientifique (latin), avec en regard de chacune le nom usuel en français, et maintenant en espéranto !

Ce petit travail m'a pris beaucoup de temps, parce que j'ai fait tout mon possible pour ne pas faire de vulgaires traductions mot à mot depuis le terme français, ni rajouter bêtement un o à la fin du nom latin (même si l'ingéniosité de l'espéranto fait que cette méthode fonctionne très souvent). J'ai fait un gros travail de recherche qui m'a beaucoup intéressé, pour comprendre le sens du nom latin, l'origine du nom espéranto existant et recouper les multiples informations en provenance de différents sites internet.

Donc, si vous aimez la nature, venez faire un petit tour et poster un commentaire, cela me fera très plaisir.

Je vous souhaite une bonne visite !

ALAIN GÉRARD

Charlotte se présente

Saluton!

Je suis Charlotte, volontaire en service civique pour les 8 prochains mois au sein du Centre Culturel Esperanto de Toulouse !

Originaire d'une petite ville en région parisienne, je suis arrivée à Toulouse il y a maintenant 5 ans afin d'y poursuivre mes études en communication et médiation culturelle.

Très attirée par les milieux culturels et associatifs, j'ai eu l'occasion tout au long de mon cursus d'effectuer des stages dans différentes structures culturelles, telles que l'association – et festival - Le Printemps des Etudiants, le service culturel du CHU de Toulouse ou encore l'association Le Trait Bleu et son festival de danse Ravensare. Ces expériences m'ont donné l'envie de poursuivre dans cette voie et de m'investir sur un projet à long terme, d'où mon désir de faire un service civique !

C'est durant mes études que j'ai découvert l'esperanto, au détour d'un cours de géopolitique. Cette langue m'a tout de suite intriguée, mais sans prendre le temps de réellement me pencher dessus... et lorsque, quelques années plus tard j'ai vu l'annonce pour effectuer une mission de service civique au sein du Centre Culturel d'Esperanto, j'ai bondi sur l'occasion ! Si aujourd'hui mes connaissances en la matière sont un peu rudimentaires, j'espère en apprendre davantage à votre contact tout au long de ces prochains mois, et pouvoir bientôt tenir une petite conversation en esperanto !

Ĝis baldaŭ!

CHARLOTTE

Stage

Kreu vian mondon... kaj lernu Esperanton!

Por la venonta staĝo en Arrout, ni ekhavis ideon: proponi al vi "ĝeneralan simuladon" aŭ rolludon. Klarigas Nicolas, kiu gvidos tiun novtipan kurson.

Kio estas?

Ĝenerala simulado konsistas el krei universon kun nerealaj identecoj. En tiu aranĝo, okazas diversaj interagoj kaj situacioj kiuj ebligas uzi lingvon. Sur la malsamaj eventoj baziĝas nia komunikado. La preparado devigas nin labori kaj verki esperante.

Ekzemple :

1. Ni imagas domegon kie ni estas loĝantoj, tio estas la loko.
Kie precize ni loĝas, kiuj ni estas: ni konstruas nian rolulon.
2. Ni fiksas dekoron: kiaj estas la strato, la domo, la apartementoj.
Ni skribas regularon, anoncojn, afiŝojn...
3. Etoso: ni verkas pri familiaj rilatoj en ĉiu domo, rilatoj inter najbaroj, renkontoj en la ŝtuparo.
4. Eventoj, okazaĵoj: kunveno inter la loĝantaro, brulego, inundo.
5. Aliaj ideoj: iu povas esti brokantisto, alia policano, aliaj geamantoj, ni povas imagi bruojn, odorojn, invitojn, kio estas la keloj, problemojn pri muziko...

Ĉu vi estas interesataj? Nepre informu nin por konstrui kune nian teatraĵon kaj lerni esperanton alimaniere.

Alternatiba Tuluzo, granda defio, granda sukceso

Larĝe superante la nombron atenditan, kun 35 000 partoprenintoj la 12an kaj 13an de septembro, Alternatiba Tuluzo respondis la klimatan defion !

La movado Alternatiba naskiĝis en Bajono, sudokcidente en Francio, en oktobro 2013. Lanĉis ĝin la asocio BIZI por :



Atentigi ĝenerale la publikon pri la urĝeco de la klimata defio.

Konkrete montri, ke solvoj ekzistas, ke oni ĉiutage sukcese aplikas ilin, ke ili alireblas al ĉiu ajn.

Batali kontraŭ la sento de senpovo kaj do la malmobiliziĝo, proponante alternativojn individuajn, kolektivajn, lokajn aŭ sistemajn kontraŭ la kaŭzoj de la klimata malreguliĝo, de la energia krizo, kaj de iliaj ekonomiaj kaj sociaj konsekvencoj.

Modifi la individuajn kondutojn per praktika pedagogio.

En Oktobro 2013, en Bajono, pli ol 500 volontuloj akceptis pli ol 15000 partoprenintojn. Tiam, ili alvokis al plua agado kaj al kreado de multaj kolektivoj, kaj al organizado de plej multaj eventoj, ĉie en Francio kaj en Eŭropo.

Kial kaj en kiu kunteksto naskiĝis la movado ?

Parizo gastigos fine de 2015, mondan konferencon pri la klimato (la COP 21).

En tiu perspektivo, kvindeko da Alternatiba organiziĝos ĝis Novembro 2015 en Francio kaj Eŭropo, Alternatiba Tuluzo estos unu el ili. Ĝis nun, tiu de Tuluzo estis la pli sukcesa laŭ nombro de vizitantoj kun 35 000 partoprenintoj.

La publiko scivola, atenta, interesata kaj avida je informoj malkovris ĉe budoj de 200 asocioj, centojn da iniciatoj lokalaj kaj konkretaj por lukti kontraŭ la klimata ŝanĝo. La etoso estis varma, familia kaj festa. La vetero fine restis sufiĉe bela malgraŭ timigaj progrozoj, apenaŭ pluvetis fine de la unua tago.

En la vilaĝo « Edukado » de la eventejo, Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo proponis plurajn agadojn laŭ la du tagoj. Multaj el la partoprenintoj vizitis la priesperantan standon kaj la ekspozicion pri Esperanto kaj lingva diverseco. Kelkaj partoprenis 2 fulmajn kursetojn kaj deko da scivoluloj spektis videon pri la projekto « springboard to languages » kaj aŭdis pri la eŭropa grundvig projekto « elloke tutmonden ». La ĝenerala intereso estis granda kaj dank' al la dekduo de esperantistoj kiuj deĵoris ĉe la stando, la multaj demandoj trovis siajn respondojn.

Alternatiba Tuluzo, kolektivo de individuoj kaj asocioj daurigos la mobilizadon por socia kaj ekologia transirado partoprenante la mondan vilaĝon de alternativoj kiu okazos en Montreuil, apud Parizo la 5an kaj 6an de decembro, dum la COP 21.

Esperantistoj partoprenos ĝin, ĉu ankaŭ vi?

MARION

Kataluna kongreso fine de oktobro en Mataró

La katalunaj kongresoj de Esperanto kunigas altnivelajn prelegojn kaj buntan artan programon kun unuarangaj gastoj el diversaj mondopartoj. En Mataró, la temo de la 37a kongreso estas intime ligita al la urbo ĝin gastiganta : ŝancoj de enmigrado. Pluraj tuluzanoj partoprenos ĝin.

Katalunaj kongresoj de Esperanto kunigas altnivelajn prelegojn kaj riĉan artan programon kun unuarangaj gastoj el diversaj mondopartoj. Ĉi-jare la temo de la 37a Kongreso estas intime ligita al la urbo ĝin gastiganta: **ŝancoj de enmigrado**

Mataró spertis industriajn kreskon kiu venigis milojn da enmigrintoj. Tiu enmigrado okazis ĉefe en la jaroj 1960aj kaj 1970aj, kiam dekmiloj da enmigrintoj venintaj el la sudo de Hispanio, ekloĝis la periferion de Mataró, kreante kelkajn kvartalojn malproksimajn de la urbocentro. Nuntempe, la urbo spertas duan alvenadon da inmigrintoj, venantaj ĉefe el Magrebo, Ĉinio, Orienteŭropo kaj Sudameriko.

Esperantistoj aprezas lingvan diversecon kaj defendas ĝin, ĉar ili konsideras, ke ĉiuj lingvoj estas samrajtaj dum ili estas malsimilaj. Neniu lingvo rajtas subordigi alian.

Ĉiu popolo sian lingvon

En la mondo estas parolataj inter 4000 kaj 6000 lingvoj, el kiuj, laŭ la optimistoj, 50% riskas malaperi post kelkaj jaroj. 96% da lingvoj estas parolataj de nur 4% de la homaro. La esperantistaro scias, ke la kvanto da parolantoj estas ja grava, sed tamen ĉiuj lingvoj, kaj majoritataj kaj minoritataj, montras novajn perspektivojn kaj estas same valoraj.

Kiam lingvo malaperas, tiam malaperas vivkompreno kaj esprimkapablo. Lingva malekvilibro igus la homaron malriĉa je ideoj, pensoj kaj manieroj vivi kaj esprimi la realon.

La propono de Esperanto estas respektema al ĉiuj lingvoj kaj rifuzas lingvan trudon, helpante la konservon de la spaco de ĉiu lingvo. La propra lingvo estas la plej valora bonaĵo de ĉiu el ni, riĉeco valorigenda ĉar identigas kaj kortuŝas nin: diru "dankon" al kiu ajn sialingve, eĉ se komplike, certe vi igos tiun rideti!

Se vi ankoraŭ ne partoprenis en esperanta aŭ en internaciisma evento, ni invitas vin vidi, ke temas pri tutmonda movado aganta por lingva diverseco, ĉar ĝi batalas por la rajto de ĉiuj popoloj uzi sian propran lingvon.

Ĝuu la kongreson, estu libera mem opinii kaj vidi mondon kie lingvoj kaj kulturoj ne kverelas, sed kundancas belan dancon. Vi estas avertita, ne maltrafu tiun okazon!!!

LA ORGANIZANTOJ

Brève

La langue occitane est classée par l'UNESCO comme une des langues en «sérieux danger d'extinction». Le 24 octobre, après Carcassonne, Béziers et Toulouse où en 2012 s'étaient réunies plus de 30000 personnes, face à ce péril grandissant et aux risques de régression qui menacent la langue, la « Coordination per la lenga occitana » appelle à une mobilisation citoyenne pour une grande manifestation sociale et revendicative en faveur de l'occitan le :

Samedi 24 octobre 2015 à 14h, à Montpellier

En effet, depuis 2005, la Coordination n'a cessé d'alerter les pouvoirs publics sur l'urgence de mettre en place une politique linguistique publique cohérente et volontariste pour la transmission et le développement des langues régionales (et donc de l'occitan), sur la nécessité d'une loi qui officialise leur reconnaissance et leur garantisse un statut juridique légal propice à leur expansion.

Comme à Toulouse, de nombreux espérantistes de toute l'Europe se joindront à la manifestation.



Multaj novaĵoj en nia libroservo

Un petit échantillon des acquisitions de la rentrée 2015, le reste à découvrir sur la librairie en ligne du portail de l'espéranto en Midi-Pyrénées.



Vetero kaj klimato de la mondo *Denis Riley, Lewis Spolton. Tradukis K. Long*

Sur la météo et le climat. D'actualité ! Oeuvre reconnue de popularisation scientifique, richement illustrée.



La trajno en la neĝo *Mato Lovrak. Tradukis J. Pleadin*

Après "La kamaradaro de Petro Nodeto" (1998), voici le deuxième livre en espéranto du fameux auteur croate de livres pour enfants Mato Lovrak.



Sinonima vortaro de Esperanto *Emil Dimov*

Plus de 4500 racines et plus de 7 200 synonymes




Tee-shirt Alternatiba (coton bio) *Alternatiba*

Vert, au dos, en 12 langues dont l'espéranto
"Changeons le système pas le climat"



La Fenomeno Esperanto *William Auld*

Etude sur les problèmes linguistiques et la langue internationale. Publiée en vue de traductions dans les langues nationales.




Izolo *K. Kalocsay*

Le troisième recueil de nouvelles du grand auteur espérantiste.

Sur esperanto-midipyrenees.org, vous découvrirez un grand choix d'ouvrages (plus de 250 titres) pour **apprendre la langue**, de livres de lecture pour tous les âges et pour tous les niveaux, de livres écrits directement **en espéranto** ou traduits de diverses langues, de livres **en français** sur la communication internationale et l'espéranto, ainsi que d'une **vingtaine de CD** édités par nos partenaires de Vinilkosmo.

Vous pouvez **consulter les fiches** descriptives de chaque livre ou CD, classées en 12 catégories que vous pourrez retrouver dans le menu de droite, **voir l'état du stock** en temps réel, **passer commande** en ligne.

L'agenda du Kroko'



Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : esperanto-midipyrenees.org
Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christophe au 06.31.80.40.07 ou 05.81.34.72.37, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr

SEPTEMBRE - SEPTEMBRO 2015

Samedi 26 septembre : Atelier de découverte de l'espéranto

Horaire : 14h à 16h

Lieu : Toulouse, Maison des Associations Niel

Dimanche 27 septembre : Journée Européenne des Langues

Horaire : tout l'après-midi

Lieu : Toulouse, quartier Arnaud Bernard

Dimanche 27 septembre : Babilmanĝo

Horaire : à partir de 11h

Lieu : La Maraude Arrout

Mardi 29 septembre : Atelier de découverte de l'espéranto

Horaire : 17h30 à 19h00

Lieu : Toulouse, Maison de Quartier de Rangueil

Mardi 29 septembre : Café des langues

Horaire : à partir de 19h30

Lieu : Toulouse, bar le Cactus

OCTOBRE - OKTOBRO 2015

Vendredi 02 octobre : Manĝo-klaĉo

Horaire : 20h

Lieu : Toulouse, Maison de Quartier de Rangueil

Samedi 03 octobre : Journée des associations solidaires

Horaire : de 10h à 17h

Lieu : Toulouse, place du Capitole

Mercredi 7 et 21 octobre : Café des langues de Foix

Horaire : De 18h à 20h

Lieu : au Léo, à Foix, 16 rue Peyrevidal

Lundi 12 octobre : Esperanto Magazino

de 20h à 21h sur canalsud.net ou 92.2Mhz à Toulouse

Emission de Radio – Musique en espéranto et chroniques (une seule émission en octobre)

Mardi 13 et 27 octobre : Café des langues

Horaire : à partir de 19h30

Lieu : au Cactus, 13, boulevard Lascrosses

Samedi 17 octobre : Place des étudiants

Horaire : 13h à 19h

Lieu : Place du Capitole, Toulouse

Dans le cadre de la semaine de l'étudiant

Samedi 24 octobre : Manif pour l'occitan

Horaire : 14h

Lieu : Montpellier

Du 30 octobre au 1^{er} novembre : Congrès Catalan d'espéranto

Lieu : Mataró, Catalogne

NOVEMBRE - NOVEMBRO 2015

Lundi 2, 9, 16, 23, 30 nov. : Esperanto Magazino

de 20h à 21h sur canalsud.net ou 92.2Mhz à Toulouse

Emission de Radio – Musique en espéranto et chroniques

Vendredi 06 novembre : Manĝo-klaĉo

Horaire : 20h

Lieu : Toulouse

Samedi 14 novembre : Forum de la solidarité internationale

Horaire : de 11h à 17h

Lieu : Jardin du Capitole, Toulouse

DECEMBRE - DECEMBRO 2015

Samedi 12 et 13 décembre : Fête de l'Espéranto

Horaire : 14h à 19h le samedi, 10h à 19h le dimanche

Lieu : Maison de la citoyenneté Nord, quartier des Minimes, Toulouse